Mi mendas aŭ donacas la sekvon:

Membrecon en ILEI kun presita IPR

por ☐ 2013 ☐ 2014 €________

Membrecon en ILEI kun reta IPR

por ☐ 2013 ☐ 2014 €________

_______ abono(j)n por *Juna amiko*

por ☐ 2013 ☐ 2014 €________

☐ Pakon de sep numeroj de Juna amiko 2009- 2010 po € 10 * €________

___ ekz. de *Detala Gramatiko de Esperanto* B. Wennergren) po €12.00 * €________

___ ekz. de *Manlibro pri Instruado de Esperanto* (red. K. Kovats) po €8.50 * €________

☐ Donacon al la Koleghelpa Kaso, por membrigi indajn kolegojn €________

☐ Donacon al Kaso Dazzini de por subteni konferenc-partoprenadon €________

☐ Donacon por sendi la revuon *Juna amiko* al indaj ricevantoj €________

* aldonu 10% por sendokostoj.

**SUME** €________

Mi pagos per: la UEA-konto ilek-a ☐, la UEA-konto juna-l ☐, la Nederlanda banko-konto de ILEI ☐

______________________

Subskribo

______________________

Loko

______________________

Dato

**Bonvenon al ILEI – la ligo kun igo**

**Aspiroj:** Kunlabori kun aliaj aziaj sekcioj pri ISOA (Internacia Simpozio de Orienta Azio) kaj inviti novajn sekciojn al la evento – la sekva okazos en Koreio en januaro 2013. Flegi novajn sekciojn en Azio. Informiĝi pri Universitata E-instruado kaj fortigi tion.



**Penny Vos, Aŭstralio, lerneja agado**

**Vivo:** Esperantistiĝo en 1966, instruisto ĉe lernejo Montessori, ludis rolon en oficialigo de Esperanto-instruado. Verkisto de libroj pri la eduka valoro de Esperanto, ligante ĝin al ŝlosilaj celoj gravaj por edukistoj.

**Aspiroj:** Produkti filmon pri la lernejoj nun instruantaj Esperanton ĉirkaŭ la mondo. Starigi retan portalon kie instruistoj, infanoj kaj gepatroj povas vidi infanojn uzi Esperanton ĉirkaŭ la mondo kun kiuj ili povas havi simplan sed veran kontakton tre frue en la lernadprocezo. Aktivigi la komisionon ĉe ILEI pri lerneja agado.


**Bharat Ghimire, Nepalo, Eksteraj rilatoj**



**Vivo:** Esperantiĝis en 1990. Sekretario de la Nepala E-Asocio. Kunfondinto de la Nepala E-Asocio kaj la Internacia Himalaja Renkontiĝo. En 2006 instruis Esperanton en la Filipinoj. En 2012 kunorganizis la Unuan Seminarion de Sudaziaj Landoj en Katmanduo; nun laboras por la regiona movado.

**Aspiroj**: Aktivigi la eksterajn rilatojn de ILEI; katalogi organizojn kun kiuj indos starigi rilatojn, kunlabori en la konstruado de la multlingva liga retejo. Aktive labori pri universitata kunlaboro, precipe interkontinente, pere de la tiucela komisiono de ILEI.

**Enikő Zengő Sereghy, Hungario, ekzamenoj kaj varbado**



**Vivo:** Eklernis Esperanton en 1979. Studis en Universitato ELTE. Kiel lingvo-instruisto, aktivas pri lingvo-ekzamenoj en pluraj lingvoj i.a. Esperanto. Estrarano de HEA kaj la hungara ILEI-sekcio.

**Aspiroj:** Laŭgrade transpreni la ligan laboron pri ekzamenoj kaj instruista trejnado. Aktive labori por kreskigi la aktivecan nivelon de sekcioj de ILEI kaj sekve altigi la ligan membronombron. Mastrumi pedagogian kalendaron kaj ellabori novajn servojn por E-instruistoj.

# ILEI

## Alvenu! Aliĝu! Subtenu!

Ni ĉiuj sopiras je pli sukcesa kaj pli ago-kapabla movado. ILEI provizas modelon, inda je subteno!

**ILEI – La Internacia Ligo por Esperantistaj Instruistoj**
**ILEI – vojo al pli da novaj parolantoj de nia lingvo**
**ILEI – la proponanto de valoraj servoj…**

- Ĝuu fake valorajn kaj bonetosajn konferencojn.
- Ricevu altkvalitan revuon kvarfoje jare: temas pri la liga organo *Internacia Pedagogia Revuo.*
- Prelegu aŭ aŭskultu en universitat-nivelaj simpozioj.
- Subtenu koheran programon de instruista trejnado.
- Apogu kontaktadon kun Unesko kaj edukaj instancoj.
- Protektu la lastan fizike presatan revuon por lernejanoj – abonu la revuon *Juna amiko.*
- Partoprenu allogajn aranĝojn de niaj 34 landaj sekcioj aktivantaj en ĉiuj kontinentoj.
- Kunrolu en interkulturaj, translimaj lernejaj programoj.
- Kaj multo pli…

## Alvenu! Aliĝu! Subtenu!

Membreco en ILEI estas malferma al ĉiu. Sufiĉas, ke vi kredu je la graveco de efika, alloga instruado de Esperanto. Turnu vin al la sekcio en via lando!

La nova estraro de ILEI rompas plurajn rekordojn. Ĝi estas naŭ membra – por speguli la kreskon de la farendaj laboroj. En tiuj naŭ, ses estas novuloj, kvin estas virinoj kaj ili loĝas en kvar kontinentoj.

# Renoviga, egaleca, tumondiga

Jen koncizaj prezentoj de nia labor-teamo. Por pli da detalo, vidu nian retejon ĉe www.ilei.info.



**Stefan MacGill,**
**Nov-Zelando / Hungario, Prezidanto**

**Vivo:** Universitato de Canterbury – Geografio, Instruista Trejnejo, Christ-church, Japana lingvo, Universitato Massey. Kunfondinto Nov-Zelanda Junularo kaj la ILEI-sekcio. Direktoro Centra Oficejo (1980-84), teknika redaktoro Kontakto (1978-86), Redaktoro Juna amiko ekde 1986.

**Aspiroj:** Kunordigi la ligan laboron, teni la laborritmon. Priskribi la rolon de prezidanto por faciligi la transiron al posteuloj kaj doni utilan modelon al aliaj movadaj instancoj. Pretigi pli da gvidiloj, kompletige al nia statuto kaj regularo, por faciligi la transigon de ligaj taskoj. Partopreni en la strategiaj planoj de UEA pri edukado.



**Radojica Petrović,**
**Serbio, Sekretario**

**Vivo:** *Profesie* - matematikisto, informadikisto, instrusto pri informadikaj kaj komputik-metodikaj fakoj ĉe la Universitato de Kragujevac, Serbio. Kreis esplorrezultojn pri kvalitmastrumaj sistemoj kaj interkultura pedagogio de Esperanto. E-instruisto, prezidinto de nacia E-ligo kaj de ILEI, organizanto kaj gvidanto de internaciaj E-projektoj kaj eventoj en diversaj kontinentoj.

**Aspiroj:** Restabiligi la administrajn funkciojn de ILEI kaj plifortigi la komunikadon inter la Estraro, sekcioj kaj membraro de ILEI. Daŭrigi la kreskon de ILEI-konferencoj kun programa riĉeco kaj kunlaboro kun akademiaj institucioj en pedagogio kaj kulturo. Iniciati kaj realigi E-projektojn kun subvencioj el ekstermovadaj fontoj subtene al plifortigo de la interkultura agado de ILEI tutmonde, precipe en Afriko, Latinameriko kaj Azio.



**Vilĉjo Harris, Usono, Kasisto**

**Vivo:** Eklernis Esperanton en 1987, kasisto de Esperanto-USA (2004-2007), direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA depost 2007. Multjara membro de la Usona ILEI-sekcio.

**Aspiroj:** Finlerni la konto-mastruman sistemon de la Ligo, kunlabori en la formulado de buĝeto 2013, kaj gvidu la formadon de postaj buĝetoj. Mastrumu la kasojn, bilancon kaj jarajn spezojn por teni la ligon en bona stato; partopreni en debato kiel kreskigi la nekotizajn enspezojn de la Ligo, pere de fondaĵoj kaj projekto-konkursoj.



**Zsófia Kóródy,**
**Hungario / Germanio, Vic-Prezidanto**

**Vivo:** Diplomita instruisto de la angla, hungara kaj Esperanto (ELTE). Ĉefkunlaboranto de Interkultura Centro Herzberg, prezidanto de la germana ILEI-sekcio.

**Aspiroj:** Prizorgi normigitan internacian ekzamensistemon por instrukapabligo, instigi kaj flegi kunlaboron inter Esperanto-klerigejoj, ekzamenejoj, kulturcentroj kaj kun neesperantistaj fakrilataj organizaĵoj, fortigi reprezentiĝon ĉe ALTE.



**Magdaléna Feifičová (Fejfi),**
**Slovakio, Vic-Sekretario**

**Vivo:** Esperantistiĝis en 1987. Profesie laboris en Transporta Esplorinstituto en Žilina, organizis multajn renkontiĝojn, finstudis ĉe la universitato UAM en Poznano. Agadas en pensiulaj rondoj.

**Aspiroj:** Transpreni prizorgadon de la membro-administrado, kadre de la sekretaria teamo. Fortigi sekcian laboron, kiel ankaŭ kuraĝigo al unuopulaj instruistoj fondi grupojn kaj proponi al ILEI novajn sekciojn.

**Prof. d-ro. GONG Xiaofeng, (Arko),**
**Ĉinio, Universitata kaj azia agado**



**Vivo:** Universitato de Nanchang pri media protektado(ekde 1994-), Cardiff Universitato (Britio, 2006-2007) pri media scienco; Kemia analizisto (1981-1991). Prezidanto depost 2006 de Jianĝia Esperanto-Asocio, sekciestro de la ĉina ILEI-sekcio depost 2009.

Plena Nomo: * ______________________________

Alfabetiga Nomo: * ______________________________

Sekso*: ☐ Ino ☐ Malino. Naskiĝdato: ______________

Strata aŭ poŝta adreso: * ______________________
\
______________________________________________

Poŝtkodo, lando: * ______________________________

Retadreso: (deviga por ret-abono) ________________

Instrua agado: ___________________________________

☐ Bv. sendi al mi specimenan ekzempleron de *IPR*.

☐ Bv. sendi al mi ekzempleron de *Juna amiko.*

☐ Vi rajtas sendi al mi informojn aŭ demandilojn pri ILEI.

☐ Bv. sendi informojn pri la sekva ILEI-konferenco. La 46a okazos en julio 2013, Herzberg-Sieber, Germanio.

Sendu ĉi tiun mendilon poŝte al: Oficejo de ILEI, p/a ICH, Grubenhagenstr 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tamen, se eble bv. mendi rete, kun informoj el ĉi tiu mendilo, al <ilei.oficejo@gmail.com> kaj <ilei.kasisto@gmail.com>, kaj por Juna amiko al Sebastian Cyprych ĉe <sebacyp@jabster.pl>.

*Internacia Pedagogia Revuo* aperas 4-foje jare, 44p.
*Juna amiko* aperas 3-foje jare, 52 p.

| | A-lande | B-lande | C-lande |
|---|---|---|---|
| Membro (IPR presita) | € 20 | € 10 | € 2 |
| Membro (IPR reta) | € 10 | € 5 | € 1 |
| Juna Amiko | € 16 | € 11 | € 11 |
| JA ekde 3 ekz., po | € 13 | € 9 | € 9 |

Por listo de C-landoj, vidu ĉe www.ilei.info

Nederlanda bankokonto de ILEI: ING Bank N.V., kontonumero: 4676855; BIC: INGBNL2A; IBAN: NL55INGB0004676855. Por pagoj el ekster la Eŭropa Ekonomia Areo bonvolu. aldoni €5 por la bankokostoj.

----------- ADMINISTRADO --------------

Membreco, abonoj registritaj: loko, dato______________________

Aperintaj revuoj: liveritaj ☐ liverendaj ☐ ________________

Libromendoj: fakturitaj ☐ senditaj ☐ ____________________